Annette von Droste-Hülshoff,

# Ĉu havas iu manon tiel fajnan

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉu havas iu manon tiel fajnan,
kapablan dispartigi ĉiun ajnan
konfuzon cerban, firman tiel, ke
la ŝtonon ĵetas ĝi tremante ne?
Kaj kiu riskas ĝuste juĝi vantan
impeton, pesi vorton ofendantan,
radikiĝintan iam firme en
la juna brust', de l' antaŭjuĝ' venen'?
Vi feliĉul', naskita en la hela spac',
flegita vi de pia man' en pac',
ne pesu! Ŝtonon lasu kuŝi vi,
ĉar trafos vian propran kapon ĝi!

*Traduko de la Germana poemo "Wo ist die Hand" de* Annette von Droste-Hülshoff *(∗1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-1120-2267 (2015-01-28 11:32:46)*

*Tiu ĉi poemo staras je la komenco de la novelo "La juda fago".*

Annette von Droste-Hülshoff,

# Wo ist die Hand

Wo ist die Hand so zart, daß ohne Irren
Sie sondern mag beschränkten Hirnes Wirren,
So fest, daß ohne Zittern sie den Stein
Mag schleudern auf ein arm verkümmert Sein?
Wer wagt es, eitlen Blutes Drang zu messen,
Zu wägen jedes Wort, das unvergessen
In junge Brust die zähen Wurzeln trieb,
Des Vorurteils geheimen Seelendieb?
Du Glücklicher, geboren und gehegt
Im lichten Raum, von frommer Hand gepflegt,
Leg hin die Waagschal', nimmer dir erlaubt!
Laß ruhn den Stein, - er trifft dein eignes Haupt!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Annette von Droste-Hülshoff *(∗1797-01-10 – †1848-05-24).*

*Arg-1120-2266 (2015-01-28 11:25:23)*

*Dies Gedicht steht am Anfang der Novelle "Die Judenbuche".*